

FABELOJ, FABLOJ & ANEKDOTOJ

tradukoj kaj originaloj de Cezar

& klubo Karapaco



ENHAVO
TRADUKOJ & ORIGINALOJ

FABELOJ

Grimm

Lupo kaj sep kapridoj

FABLOJ

B.Traven

Kiu esta la mastro de l' vivo?

Cezar

Birdohomo

Dancanta akvoguto

Pri viro, kiu ĉiam ridetis

Pri viro, kiu forgesis sin

Charms, Daniil

La kvarkrura korniko

Da Vinci, Leonard

La papilio kaj la lumo

La razotranĉilo

Ezopo

La kamelo

Hanfejtze

Tio, kio malfacile pentreblas

Hohler, Franz

La malsimilaj tervermoj

Huwylar, Max

Ĉe la festo de testudoj

Kafka, Franz

La ekiro

La ponto

La turbo

Malgranda fablo

Kunert, Günter

Konata iu

Kunze, Reiner

La fino de l' fabloj

La Fontaine

La konsilio de la ratoj

Lichtenberg, Georg Christoph

La ŝuo kaj la pantoflo

Lukiano

La junulo sur la galopanta ĉevalo

Mauthner, Fritz

La viktimo

Meng, Wang

Malgranda, eta kaj eĉ pli eta

Monterroso, Aŭgusto

La kredo kaj la montoj

Mouzi

La bovo kaj la harpoludo

Mrožek, Sławomir

La cirk-artisto

Pestalozzi, Johann Heinrich

Stranga promenmrajdo

Mühsam, Erich

La diveno

ANEKDOTOJ

Anonimulo

Doni estas pli benigna ol preni

Coelho, Paul

La heroldo de l' bono
Galgo en Peruo aŭ libero kaj justeco

Huebner, Wolfgang

De l' vento forblovita

Roda Roda

La poŝtaĵoj

Tucholsky, Kurt

La pulo

F A B E L O J

Fratoj Grimm

Lupo kaj sep junaj kapridoj

Lupo kaj sep junaj kapridoj

5. Vol 1

Kaprino havis sep idojn, kiujn ŝi tre amis kaj zorgeme gardis kontraŭ la lupo. Iun tagon, kiam ŝi devis foriri por alporti nutraĵojn, ŝi kunvokis ĉiujn kaj parolis: „Karaj infanoj, mi devas foriri kaj alporti manĝon, gardu vin kontraŭ la lupo kaj ne enlasu ĝin, estu ankaŭ atentemaj, ĉar ĝi ofte maskas sin kiel aliulo, sed je ĝia raŭka voĉo kaj je ĝiaj nigraj piedoj vi tuj ekkonos ĝin. Gardu vin, se ĝi jam estos en la domo, ĝi manĝos vin ĉiujn kune.“

Poste la patrino foriris, sed baldaŭ la lupo aperis antaŭ la doma pordo kaj vokis: „Karaj infanoj, malfermu, mi estas via patrino kaj kunportis belajn aĵojn por vi.“

Sed la sep kapridoj parolis: „Nia patrino vi ne estas, ŝi havas delikatan kaj kareseman voĉon, sed via voĉo estas raŭka, vi estas la lupo, ni ne malfermos al vi.“

La lupo iris al butikisto kaj aĉetis grandan pecon da kreto. Ĝi manĝis ĝin kaj tiel faris sian voĉon delikata. Poste la lupo denove iris al la pordo de la sep kapridoj kaj vokis

kun delikata voĉo: „Karaj infanoj, enlasu min, mi estas via patrino, ĉiu el vi ricevu ion.“

Sed la lupo metis piedon en la fenestron, tion la sep kapridoj vidis kaj parolis: „Nia patrino vi ne estas, ŝi ne havas nigran piedon kiel vi, vi estas la lupo. Ni ne malfermos por vi.“

La lupo nun iris al bakisto kaj parolis: „Bakisto, priŝmiru tiun piedon per freŝa pasto.“ Kaj kiam la bakisto faris tion, la lupo iris al la muelisto kaj parolis: „Muelisto, ŝutuvian blankan farunon sur tiun piedon de mi.“ La muelisto, diris, ke ne.

„Se vi ne faros tion, mi vin voros.“ Tial la muelisto devis obei.

Poste la lupo denove iris antaŭ la dompordon de la sep kapridoj kaj diris: „Karaj infanoj, enlasu min, mi estas via patrino, mi havas donacon por ĉiu el vi.“

La sep kapridoj unue volis vidi piedon, kaj kiam ili vidis, ke ĝi estas neĝe blanka kaj aŭdis paroli la lupon tiel delikate, ili supozis, ke ĝi estas la patrino kaj malfermis la pordon. Sed envenis la lupo. Kiam ili ekvidis ĝin, ili kaŝiĝis rapide, tiel bone kiel eblis, unu el ili sub la tablo, la dua en la lito, la tria en la forno, la kvara en la kuirejo, la kvina en la ŝranko, la sesa sub granda pelvo; la sepa en la murhorloĝo. Sed la lupo trovis preskaŭ ĉiujn kaj glutis ilin, nur ne la sepan en la murhorloĝo, ĝi restis vivanta.

Kiam la lupo kontentigis sian manĝan volupton, ĝi foriris. Poste baldaŭ la maljuna kaprino venis hejmen. Kia plorinda afero! La lupo ĉeestis kaj manĝis ŝiajn karajan infanojn. Ŝi pensis, ke ili ĉiuj estas mortaj, sed subite saltis la plej juna el la murhorloĝo kaj rakontis, kiel okazis la malfeliĉo.

Sed la lupo, kiu satmanĝis, iris sur verdan herbejon, kuŝiĝis sub sunbriloj kaj profunde endormiĝis. La maljuna kaprino cerbumis, ĉu ŝi tamen povos savi ilin. Tial ŝi diris al la plej juna kaprido: „Prenu tvirnon, kudrilon kaj tondilon kaj sekvu al mi.“

Poste ŝi eliris kaj trovis la lupon ronkantan kuŝantan sur la herbejo. „Jen kuŝas la malica lupo, kiu je la kvara posttagmeze dum la manĝotempo voris miajn ses infanojn“, ŝi diris kaj rigardis ĝin de ĉiuj flankoj. „Donu foje la tondilon al mi. Ho ve! Kaj, se ili en ĝia ventro ankoraŭ estas vivantaj, ĉu!“ Kaj jam ŝi malfermtranĉis ĝian ventron, kaj la ses kapridoj, kiujn la lupo pro avido glutis entute, elsaltis tute sanaj. Ŝi tuj ordonis al ili alporti grandajn kaj pezajn ŝtonojn. Per tiuj ili plenigis la korpon de la lupo, kunkudris ĝin, forkuris kaj kaŝiĝis post heĝo. Kiam la lupo finfine eldormis, ĝi sentis grandan pezon en sia korpo kaj parolis: „Kiel klakas, kiel krakas! Mian ventron io frapas! Kiel klakas, kiel krakas! Mian ventron io frapas! Kio tio estas? Mi manĝis nur ses kapridojn.“ Ĝi pensis, ke ĝi trinku freŝan akvon, ke tio eble helpos al ĝi. Tial ĝi serĉis puton. Sed, kiam ĝi kliniĝis trans la putorandon, ĝi ne plu povis firmiteni sin pro la pezo de la ŝtonoj kaj falis en la akvon. Kiam vidis tion la sep kapridoj, ili alkuris kaj dancis pro ĝojo ĉirkaŭ la puto.

tradukis Dorothea & Hans-Georg Kaiser laŭ „Der Wolf und die sieben Geißlein“ el la unua eldono de la fabelo, Jakobo kaj Vilhelmo Grimm, Infan-kaj domfabeloj, Berlino 1812 ĝis 1815, du volumoj, unua volumo p.17-20

F A B L O J

Cezar

Birdohomo

Certaj azenoj kaj Esperanto

Dancanta akvoguto

Pri viro, kiu ĉiam ridetis

Pri viro, kiu forgesis sin

Charms, Daniil

La kvarkrura korniko

Da Vinci, Leonard

La papilio kaj la lumo

La razotranĉilo

Hohler, Franz

La malsimilaj tervermoj

Huwyler, Max

Ĉe la festo de testudoj

Kafka, Franz

La ekiro

La ponto

La turbo

Malgranda fablo

La Fontaine

La konsilio de la ratoj

Mauthner, Fritz

La viktimo

Meng, Wang

Malgranda, eta kaj eĉ pli eta

Mrožek, Sławomir

La cirk-artisto

Mühsam, Erich

La diveno

Pestalozzi, Johann , Heinrich

Stranga promenrajdo

B. TRAVEN

B. Traven

Kiu estas la mastro de l' vivo?

(eltiraĵo el la romantraduko „Rozo Blanka“)

Eble Hacinto, la indiĝeno, estis la mastro de l' vivo, kiu posedis Rozon Blankan sen posedi ĝin. Li eble estis la mastro de l' vivo ĝis tiu tago, kiam oni eltrovis, ke Rozo Blanka portas nafton en sia tero.

Tiam ankaŭ Hacinto Yanyez ne plu estis la mastro de l' vivo; ĉar nun ankaŭ li fariĝis sablero ĵetata en la maŝino tien kaj tien.

Eble Margarito estis la mastro de l' vivo, tiu Margarito, kiu kuracadis la mulojn, kiu komprenis la lingvon de la muloj, kiu infere kapablis sakri kaj melodie kanti dolĉajn baladojn en la sama momento.

Eble la compadres de Rozo Blanka estis la mastroj de l' vivo. Tiom longe, ĝis ili perdis sian hejman regionon.

Eble la mastro de l' vivo estis la leono en la ĝangalo. Sed la puloj estis pli fortaj ol ĝi, ĉar ili molestis ĝin. Kaj ĝi ne povis defendi sin kontraŭ ili; dorno, kiun ĝi tretis en sian piedegon, estis pli forta ol ĝi, ĉar la dorno lamigis ĝin; la venena serpento, kiu mordis ĝin en la nudan nazon, se ĝi estis neatentema, povis faligi ĝin, kaj tial ĝi estis pli forta ol la leono.

Eble la mastro de l' vivo estis la kolorriĉa papilio, kiu ŝvebis kiel ondo de floro al floro kaj zorgis pri nenio, ĝuis sian vivon, ĝis ĝi kaptiĝis en la reto de araneo, kiu estis pli forta ol ĝi.

Eble la mastro de l' vivo estis la klasfiera laboristo, kiu boksis sian skipestron teren kaj sufiĉe draste tradraŝis lin, ĉar la skipestro, kiu sentis sin pli forta kaj pli potenca, kriis lin vizaĝen. Sed la diligenta laboristo pli produktis ol la merkato povas uzi, kaj la fabriko ne plu povis pagi la viron kaj devis maldungi lin; kaj liaj infanoj ŝiris la karnon de la laboristo, ĉar ili estis malsataj kaj sentis sin kiel mastroj de l' mondo, kies sklavo kaj subulo estas laŭ ilia opinio la propra patro.

tradukis Hans-Georg Kaiser

CEZAR

Certaj azenoj kaj Esperanto

Dancanta akvoguto

Pri viro, kiu ĉiam ridetis

Pri viro, kiu forgesis sin

Birdohomo

Viro kun la nomo Malgriz, kiu – sen frapi ies atenton – vivis dum multaj jaroj en Grizlando, en nubskrapulo, forlasis iutage sian loĝejon proksime de la kelo kaj veturis per la lifto supren.

Sur lia dorso videblis du flugiloj, kiuj iom ĝenis lin, kiam li iris en la lifton. La nubskrapulo havis 45 etaĝojn. Tute supre li preskaŭ firmpinĉiĝis kun la flugiloj en la lifto.

Tiam li iris tra fera pordo sur la tegmenton, rapide kaj forte enspiris kaj ekflugis per siaj flugiloj kiel birdo aŭ anĝelo en la aeron.

La loĝantoj de la nubskrapulo rigardis ĉiuj el fenestroj kaj kelkaj kuris al la tegmento. Ili kriis, ekscitiĝis, montrofingris. Kelkaj damoj paliĝis kaj aliaj personoj scivole rigardis tra binokloj.

Policisto vokis :„He, frenezulo, revenu, ĉu vi ne scias, ke tio estas trafika delikto, simple ekflugi sen demandi nin antaŭe !“

Sed la ulo ridis nur kaj mansalutis kun sia pajloĉapelo. Li kriis rikane malsupren : „Ĝis do, aĉa mondo !“

Suno ardis. La birdohomo flugis pli kaj pli alten, sed li ne estis Ikaro, kaj tial li ne falegis.

Baldaŭ li estis nur plu punkto en la fora horizonto, kaj fine li tute malaperis. La homoj kapneis mirigite.

Sed jam post tri jaroj neniu plu volis koncedi, ke tio vere okazis. Eĉ tiuj ne, kiuj vidis tion per siaj propraj okuloj. Ili interkonsentiĝis, ke tio estis nur sorĉista truko, ke li ne vere flugis kiel birdo.

Profesoro pentris bildon de tiu flugo, sed sur ĝi li jam aspektis preskaŭ kiel fluganta dio en la libroj de Däniken, tute ne plu tiel kiel la najbaro Malgriz, kiu dum kelkaj jaroj loĝis kun ili en la sama enua nubskrapulo.

Sed Malgriz estis ŝajne pli kuraĝa ol ili, li ne nur volis skrapi la nubojn, lia apetito pri novaj horizontoj evidente estis multe pli granda ol tiu de la kutimaj homoj en Grizlando.

verkis Hans-Georg Kaiser (Cezar)

Certaj azenoj kaj Esperanto

Kelkaj azenoj estas eĉ profesoroj de la lingvistiko, kiuj kondamnas Esperanton; jen ilia „plej konvinka“ argumento, kial E-o ne taŭgas: „Ĝi estas artefarita.“

Ili ne komprenas kaj neniam vere pensis pri tio, ke ankaŭ iliaj dentoj estas parte artefaritaj kaj tamen taŭgas. La ĉiutaga realeco ne interesas ilin, ĉar ĝi estas por ili nur fabelo el post sep montoj. Ili sidas en siaj lakitaj ebonaj turoj kaj scias ĉion pli bone ol ĉiuj aliaj ekster la turoj. Ĝuste tial ili estas universitatprofesoroj... kaj tial Esperanto estas laŭ ili kriplica idiotaĵo, sed tion ili ofte nur pensas, ne diras...pro azena ruzeco. Tamen ilia lango perfidas ilin, ili estas simple nur venenigitaj.kaj kompreneble ili ankoraŭ neniam disipis tempon almenaŭ iomete lerni E-on antaŭ ol kondamni ĝin. Ili estas kiel malicaj hundoj, kiu fekas sur ĉion, kion ili ne konas.

verkis Hans-Georg Kaiser (Cezar)

Dancanta akvoguto

(pri memakvarelo)

Artiston vizitis iam dancanta akvoguto, kiu iam falis sur lian akvarelfolion. Ŝajne intence, por montri al li kaj al ni ĉiuj kiel fantasta kaj fantaziplena estas la mondo. Li ne devis pentri la dancantan akvoguton, tion la guto faris kvazaŭ mem, ĉar ĝi saltis en la ĝustatempa momento sur la ĝustan lokon de la malseka folio. La pentristo ne devis fari multon por krei unikan akvarelon: li aldonis nur kelkajn akvopunktetojn kaj la lupon kun kadro al la dancanta akvoguto. Tiel la efemera akvoguto kvazaŭ fariĝis arto kaj tiel ankaŭ eterniĝis.

verkis Hans-Georg Kaiser (Cezar)

Pri viro, kiu ĉiam ridetis

(fablo)

Estis foje viro, kiu ridetis la tutan tagon. Jam kiel infano li ĉiam ridetis. Li ridetis kaj ridetis kaj ridetis. Se iu ridetis, ankaŭ li ridetis. Se iu ridis, li ridetis. Se iu ploris, li ridetis. Se li estis feliĉa, li ridetis. Se li estis malĝoja, jen li ridetis.

Tiel tio iris dum multaj jaroj.

Li tiom kutimiĝis pri la ĉiama ridetado, ke iam li jam ne plu kapablis montri seriozan vizaĝon. Ĉe ĉiuj okazoj li ridetis. Li ridetis eĉ, se oni murdis homojn antaŭ liaj okuloj. Li ridetis, kiam li aŭskultis, ke lia edzino mortis aŭ kiam li eksciis, ke en Japanio falis la atombomboj.

Li ridetis kaj ridetis kaj ridetis.

Ĉar li ĉiam ridetis, li estis ĉie tre ŝatata. Ĉiuj pensis, ke li estas bonulo, sed li estis nur ridetulo. Ridetante li grimpis sur la kariera eskalo kiel skarabohomo pli supren kaj pli supren. Fine li fariĝis eĉ la prezidanto de granda lando.

La popolo nomis lin: „La ridetulo.“

Ĉiuj pensis, ke li estas ege saĝa. Sed li estis nek saĝa nek malsaĝa. La eksterordinara je li estis nur lia eterna rideto. Estis simple tiel, ke la masko sur lia ridetanta vizaĝo firmfrostiĝis.

Kiam li jam estis morta, li ridetis plu. Kaj tial la homoj apud lia ĉerko ektimis, ĉar ili ĉiuj pensis, ke li ridetas plu pri ili. Ili ja ne sciis, ke firmfrostiĝis nur lia ridetanta masko.

Verkis Hans-Georg Kaiser (Cezar)

Pri viro, kiu forgesis sin

Survoje, kiam li forgesis sin, li venis en urbon, kiu nomiĝis: Esperantoburger.

Sur la foirplaco ili ĝuste starigis budojn kaj benkojn, kaj biertendon. Laŭtparoliloj muĝis, karuselo turniĝis. Fortikulo montris siajn muskolojn. Sur la scenejo knabina ĥoro ekzercis laŭdokanton por la plenumkomitato de Esperantoburger.

Svelta viro, kiu aspektis kiel generalo Trotski en batalo, sabris per sia direktilo la aeron. Poste deklamis iu gravulo kun bunta kravato paroladon sur la tribuno.

La viro aĉetis glason da biero kaj bulkon kun acidaj haringoj kaj haltis ĉe ronda tablo. De tie li legis la grandliteran rubandon sur la scenejo:

„VIVU LA CEZARO!

VIVU ESPERANTOBURGER!

VIVU ESPERANTO!“

La viro pensis: Dio mia, ĉe Sankta Virgulino kaj ĉiuj sanktuloj, tiu Cezar kun la aldona vokalo o ja ne eble estas mi mem, ĉu? Li devis ekridi, ĉar li trovis tion superba ŝerco.

Li demandis inon volupte aspektantan, kiu estis vestita kiel rajdistino: „Kial tiu spektaklo, bela rajdistino? Pri kio temas, belulino? Kiun imperatoron vi ĝuste festas? La diktatoron kun la numero 2015 aŭ nur tiun kun numero 2014? Aŭ ĉu vi trovis tute novspecan heroon. Kio prepariĝas tie?“

Ŝi ridetis milde kaj diris: „Tion ĝuste demandas vi? Iomete stranga tio ja estas, sinjoro mia. Ĉu vi ne estas tiu Cezaro? Ĉu vi ne ĝuste diris tion?“

„Mi diris nur, ke mi estas Cezar, aŭ sinjoro Bluo, tiel, kiel vi volas.“

Kaj alia viro, kiu asertis esti la ĉefredaktoro de la plej grava literaturgazeto, kiu iam ajn ekzistis en la civilizita mondo, diris nun kun rikana vizaĝo: „Sinjoro Bluo, kiel mi diru tion ĝentile al vi? La tuta spektaklo temas simple

pri kompatinda viro, kiu tute forgesis sin. Tio okazas ofte.“

„Viro, kiu tute forgesis sin, ĉu?“ diris iom surprizite la naivema sinjoro Bluo.

Sed tiam li subite ekkomprenis. Tiu viro estas efektive mi mem, li pensis. Mi estas la viro, kiu tute forgesis sin.

„Dankon, ke vi atentigis min, kara sinjoro, vi pravas, homoj povas rapide forgesi sin.“

Ankoraŭ nun sinjoro Bluo gapis konsternite. Li tute ne plu rikanis, eĉ ne ridetis. Hm, mi estas do la viro, kiu forgesis sin, li pensis, tio trafas eble la kernon de la afero! Tia mi ja estas! La redaktoro pravas.

Poste li rompis al si la kapon, kion li devos ŝanĝi en sia vivo. Sed al iu vere kontentiga rezulto li ankaŭ ĉifoje ne venis. Li serĉis specon de savankro, iun fuĝvojon al nova espero, iun bluan pardonon en la griza subĉielo, iun novan utopion en la malproksima horizonto. Sed li ne trovis ion vere taŭgan, ĉar li jam sciis, ke tio tiel facila ne estas.

Finfine li diris al si: „Kion fari? Ankoraŭ mi ja vivas, ĉu ne? Mi do iros plu. Kiel kutime, kiel mi faras tion jam dum multaj jaroj. Ion pli bonan ol la morton mi trovos en ĉiu kazo.“

Li prenis sian ioman havaĵon kaj ekmarŝis en aliajn urbojn, en aliajn landojn, en aliajn mondojn. Sed kien ajn li venis, tuj iu gardisto ekvokis: „Jen vidu al tiu fremdulo, al tiu paradizbirdo kaj senhejma vagabondo. Li estas tute certe aroganta kaj orgojla. Vidu tiun impertinentan vizaĝon. Gardu vin kontraŭ tiaj! Ne sekvu lian malbonan ekzemplon. Li estas la viro, kiu forgesis sin!“

Verkis Hans-Georg Kaiser (Cezar)

CHARMS, DANIL

Daniil Charms

La kvarkrura korniko

Estis iam korniko, kiu havis kvar krurojn. Propre ĝi havis eĉ kvin da ili. Sed pri tio eĉ ne indas paroli.

Iam la kvarkrura korniko aĉetis kafon kaj pensis: „Nu, mi aĉetis kafon, sed kion mi faru nun kun ĝi?“

Jen malbonŝance proksimiĝis vulpo survoje. Li vidis la kornikon kaj vokis al ŝi:

„He!“ – vokis ĝi, „korniko!“

Kaj la korniko vokis al la vulpo: „Vi estas mem korniko!“

Jen denove vokis la vulpo: „Kaj vi, korniko, estas porko!“

Jen la korniko disŝutis pro ĉagreno la tutan kafograjnaron. Kaj la vulpo forkuris. Sed la korniko grimpis surteren kaj iris sur siaj kvar, pli precize dirate, sur siaj kvin kruroj en sian mizeran kabanon.

13-a de februaro en la jaro 1938

tradukis Hans-Georg Kaiser
laũ „Die vierfüßige Krähe“

DA VINCI, LEONARDO

La papilio kaj la lumo

La razotranĉilo

La papilio kaj la lumo

Vaganta bunta papilioflrtanta iuvespere en la malhelo tien kaj tien, celis lumon, kiun ĝi antaŭe vidis en la foro. Subite ĝi turnis siajn flugilojn al la lumo. Proksimiĝinte al la flamo, ĝi komencis vigle cirkle ĉirkaŭflugi ĝin kaj miris pri ĝi kvazaŭ estus granda miraklo. Ja kia bela ĝi estas!

Ne kontente ludi la admiranton, la papilio firme metis en sian kapon fari la saman kun ĝi kiel kun la flarantaj floroj. Ĝi malproksimiĝis, revenis kaj flugis kuraĝe al la flamo, kiun ĝi supre preterire tuŝis.

Ĝi retroviĝis, senkonsciiĝinte, piede de la lumo kaj rimarkis konsternite, ke mankas unu el la piedoj kaj, ke bruligita flugilpinto nigriĝis .

„Kio tie okazis?“ ĝi demandis sin sen trovi klarigon. Ĝi absolute ne povis kompreni, ke tia bela aĵo kiel la flamo kapablas fari ion malican al tia, kia ĝi estas mem, kaj tial ĝi ree kuraĝiĝis kaj per movo de la flugiloj denove ekmoviĝis.

Ĝi flugis kelkajn lopoĵn kaj tiam turnis sin denove al la flamo por sidiĝi sur ĝi. Tuj ĝi falis ĝismorte bruligite en la oleon, kiu nutris la lange ludantan flamon.

„Damnita lumo““, suspiris la papilio, perdante sian vivon. „Mi supozis, ke mi trovus ĉe vi mian feliĉon, kaj en vero mi trovis la morton. Mi ploras pri mia stulta emo, ĉar mi tro malfrue ekkonis vian danĝeran naturon.“

„Kompatinda papilio“, respondis la lumo. „Mi ne estas la suno kiel vi supozis naive. Mi estas nur lumo. Kaj tiu, kiu ne traktas min kun prudento, bruligas sin.“

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Der Schmetterling und das Licht“

La razotranĉilo

Kiam la razotranĉilo en iu bela tago elvenis el sia tenilo servanta al ĝi kiel ingo kaj kuŝiĝis sur la fenestra breto, ĝi vidis, kiel respeguligas sin la suno sur sia korpo. Jen ĝi perceptis nekredeblan brilon, kaj enpense pri sia metio ĝi parolis al si mem: „Neniam mi volas reiri en la budon, el kiu mi venis! La dioj malhelpu, ke mia briloplena beleco estu tiom humiligata! Kia frenezo razi la sapumitajn oldulajn barbojn de stultaj kamparanoj, kia domsklava devo! Ĉu tiu korpo estas kreita por tio? Ho, ĉe Dio, ne! Mi volas kaŝi min en sekreta loko kaj tie en kvieta trankvilo pasigi mian vivon.“ Kaj tiel ĝi efektive faris.

Kiam ĝi pasigis certan tempon en sia kaŝejo, la razotranĉilo iutage revenis en la aeron; sed ho ve, jen ĝi rimarkis, ke ĝi aspektas kiel malnova rustiĝinta segilo. Kaj la suno ne refektiĝis plu sur la obtuza surfaco. Vane estis nun la pento kaj senutile la plendo. La razotranĉilo parolis al si: Ve, kiom multe pli bone mi estus farinta, se mi estus ekzercinta mian akran, aĥ, nun aĉiĝintan eĝon de la tranĉilo ĉe la frizisto! Kie estas mia brila korpo?! Ve al mi, tiu ĉi abomeninda rusto inside detruis ĝin!“

Ĝuste tiel, miaj karaj, okazos al tiuj, kiuj sin donas al la pigrumado anstataŭ labori. Ili, same al nia razotranĉilo perdos sian akran eĝon kaj la rusto de l' nesciado aĉigos ilian formon.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Das Rasiermesser“

EZOPO

Ezopo

La kamelo

Kiam la homoj vidis la kamelon je la unua fojo, ili ekmiris pri la grando de la besto kaj forkuris konsternite.

Sed baldaŭ ili konstatis, ke ĝi ne estas tiom terura, kiom ili supozis, sed ke oni facile povas bridigi ĝin. Ili kaptis ĝin kun malmulte da peno kaj uzis ĝin je sia utilo. Tute pacience ĝi lasis okazi ĉion al si, ĝi evitis ĉiun danĝeron.

Nun la homoj komencis malestimi ĝin, ĉar ĝi neneiam montris sin ribelema, sed akceptis trankvile ĉiun ofendon. Ĉiun ofendon, ili enjungis ĝin kaj lasis ĝin konduki de siaj infanoj.

Ne lasu fortimigi vin de ĉio, kio aspektas danĝera.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ germana traduko de retejo de la universitato Bremeno

HANFEJTZE

Hanfejtze el la antikva Ĉinio Tio, kio malfacile pentreblas

Pentristo pentris bildon por la reĝo de Qi. Iutage demandis lin la reĝo: „Kio estas plej malfacile pentrebla?“

„Hundoj kaj ĉevaloj“, respondis la pentristo.

„Kaj kio estas plej facile pentrebla?“ demandis la reĝo.

„Dioj kaj spiritoj“ respondis la pentristo. „Hundojn kaj ĉevalojn konas ĉiu. Oni vidas ilin ĉiutage. Je kia grado bone aŭ malbone kaj trafe aŭ maltrafe ili estas pentritaj, povas juĝi ĉiu. Sed de Dioj kaj spiritoj oni ne scias la precizan figuron, neniu vidis ilin. Tial ili facile pentreblas.“

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ germana traduko

Rimarko

Hanfejtze (280 – 232 antaŭ Kristo) estis granda juristo kaj politikisto de la antikva Ĉinio. Liaj fabloj troviĝas ankaŭ en „La vera libro pri la fontanta pragrundo“.

HOHLER, FRANZ

Francĉjo Holer

La malsimilaj tervermoj

Profunde sub acida rumeksa kampo vivis iam du tervermoj kaj nutris sin de la radikoj de acida rumekso.

Iutage diris la unua tervermo: „Ek do, mi estas sata vivi ĉi tie malsupre, mi volas vojaĝi kaj rigardi la mondon.“ Li pakis sian valizeton kaj traboris sin supren. Kaj kiam li vidis kiel brilas la suno kaj la vento karese movas la acidajn rumeksajn kampojn, lia koro malpeziĝis kaj li serpentumis gaje inter la tigoj antaŭen. Sed li apenaŭ antaŭeniĝis tri futojn, kiam malkovris lin merlo kaj voris lin.

Sed la dua tervermo kontraŭe al la alia restadis ĉiam en sia truo sub la tersurfaco, manĝis ĉiutage siajn acidajn rumeksajn radikojn kaj vivtenis sin dum la plej longa tempo.

Sed diru al mi mem – ĉu tio estas vivo?

*Tradukis Hans-Georg Kaiser
laũ „Die ungleichen Regenwürmer“*

HUWYLER, MAX

Maks Huwyler

Ĉe la festo de testudoj

Testudoj estas pezaj. Testudoj fariĝas maljunaj.

Iam testudoj festis feston. Ili renkontiĝis sur herbejo kaj manĝis herbojn. Kelkaj el ili manĝis ankaŭ limakon, se tiu ĝuste alrampis.

Testudoj manĝas lante. Ili havas multe da tempo.

Dum ili manĝis, surpiediĝis tute facila besto sur la maldekstra antaŭpiedo de testudo. Ĝi estis tiel facila, ke la testudo tute ne perceptis ĝin. Ĝi havis grandajn, preskaŭ travideblajn flugilojn. Dum longa tempo ĝi observis kiel la testudo manĝas. Post certa tempo la testudo rimarkis la fremdan beston kaj demandis, kion ĝi celas.

„Mi observas, kion vi faras.“

„Ni manĝas.“

„Manĝi, ĉu?“

„Ni manĝas. Ni havas feston. Ni havas festmanĝon. Tortü fariĝis centjara.“

„Kio estas cent jaroj?“ demandis la fremda besto.

„Jaro daŭras 365 tagojn kaj cent jaroj estas centfoje pli longtempe.“

„Kio estas 365?“

„La testudo miris, ke tiu malgranda flugbesto kun la arĝentajflugiloj ne scias, kio estas tricent sesdek kvin. Sed ĝi volonte klarigis tion. Testudoj havas multe da tempo: „365 estas nombro.“

„Ĉu nombro?“

„Ĉu vi vere ne povas nombri?“ demandis la testudo.

„Ĉu nombri? Jes ja, mi povas nombri.“

„Do, nombru!“ diris la testudo.

„Unu“, diris la la senpeza besto kaj levis kaj mallevis dum tio unu el siaj palpiloj.

„Unu. – Kaj plu!“ postulis daŭrigi la testudo.

„Unu. Nenio plu“, respondis la besto, kiu fariĝis pli kaj pli suspekta al la testudo.

„Al mi sufiĉas unu“, ĝi aldonis ankoraŭ.

„Kia stranga besto vi estas, kiu povas nombri nur ĝis unu!“

„Mi estas efemera muŝo, do unutaga muŝo.“

„Nun la testudo ekkomprenis. „Do unutaga muŝo, tiel do“, ŝi diris kaj rigardis la unutagan muŝon. Mi ne povas flugi“, ĝi diris, ĉar ĝi ne ekhavis alian ideon.

„Kaj mi ne povas manĝi. - Mi devas rampi nun plu, mi havas ankoraŭ laboron“, diris la unutaga muŝo al la testudo. „Dankon“, estis tre interese ĉe vi.“

„Volonte farite! Revenu morgaŭ!“

„Kio estas morgaŭ?“ demandis la unutaga muŝo.

Jen la testudo rimarkis sian eraron.

„Tago estas longa. Tutan vivon longa“, diris la unutaga muŝo al la testudo. Tiam ŝi forflugis zumante.

„Kiel prudente ĝi parolas“, pensis la testudo kaj detranĉis per siaj akraj makzeloj herbotigon. Kaj poste ĝi lante ŝoviĝis plu al al la sekva folio.

„Ĉu oni tiom juna povas esti jam tiom maljuna?“ ŝi pensis dum ĝi manĝis plu.

Rimarko

La efemera muŝo estas dum tri jaroj larvo. Ĝi vivas en la akvo kaj nutras sin per ŝlimo. Iutage ĝi solviĝas el la kokono de la larvo, poste ĝi disfaldas la arĝentajn flugilojn. La maskloj fekundigas la femalojn, kaj tiuj demetas ovojn. Poste ili mortas. Kaj kiam la ovoj fariĝis larvoj kaj el la larvoj ree unutagaj muŝoj, la testudoj fariĝis iom pli maljunaj.(cez)

KAFKA, FRANZ

La ekiro (fablo)

La ponto (rakonto)

La turbo (fablo)

Malgranda fablo

Gloso

Franz, do Francêjo, estas mallonga formo de Francisko.

La ekiro

Mi ordonis konduki mian ĉevalon el la stalo. La servisto ne komprenis min. Mi iris mem en la stalon, surĉevaligis la selon kaj sursidiĝis. En la foro mi aŭdis blovi trumpeton, mi demandis lin, kion tio signifas. Li ne sciis ion kaj ne estis aŭdinta ion. Ĉe la pordego li haltigis min kaj demandis: „Kien vi rajdas, mastro?“ „Mi ne scias tion“, mi diris, „nur for de ĉi tie, nur for de ĉi tie. Ĉiam plu nur for de ĉi tie, nur tiel mi povos atingi mian celon.“ „Vi do scias vian celon?“ li demandis. „Jes“, mi respondis, „mi ja diris tion: 'For-de- ĉi tie', jen mia celo.“ Vi ne kunhavas manĝoprovizon“, li diris. „Mi ne bezonas ĝin“, mi diris, „la vojaĝo estas tiom longa, ke mi devus malsatmorti, se mi ne ricevus ion survoje. Neniu manĝoprovizo povus savi min. Bonŝance ĝi estas ja efektive eksterordinara vojaĝo.“

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Der Aufbruch“

La ponto

Mi estis rigida kaj frida, mi estis ponto, trans abismon mi kuŝis. Ĉiflanke estis la piedaj pintoj, transe la manoj enboritaj; en la pecetiĝanta argilo mi firmkroĉiĝis. La baskoj de la frako flagradis je miaj flankoj. En la profundo bruas la frosta trutorivereto. Neniu turisto hazarde venis al tiu nealirebla altaĵo, la ponto en la mapoj ankoraŭ ne estis endesignita – Tiel mi kuŝis kaj atendis; mi devis atendi. Sen kunrompiĝo iam konstruita ponto ne povas ĉesi esti ponto.

Iam, antaŭvespere okazis – ĉu estis la unua ĉu la mila fojo, mi ne scias – miaj pensoj ĉiam moviĝis konfuze kaj ciam en cirklo. Antaŭ vespero ensomere, pli malhele murmuris la rivereto, mi aŭdis subite la paŝojn de viro! Al mi, al mi. – Etendiĝu, ponto, pretigu vin, senbalustrada trabo, tenu vian konfidaton. La malsekurecon de lia paŝo nerimarkeble ekvilibrigu, sed, se li ŝanceliĝos, jen montru vin kaj kiel montodio ĵetu lin sur la firman teron.

Li alvenis, per la fera pinto de sia bastono, li prifrapis min, tiam li levis kun ĝi miajn frakbaskojn kaj ordigis ilin

sur mi. En mian faskoplenan hararon li ŝovis la pinton kaj lasis ĝin longe tie kuŝi, versajne sovaĝe ĉirkaŭrigardante. Sed poste – ĝuste mi reve sekvis lin trans monton kaj valon – li saltis per ambaŭ piedoj meze sur mian korpon. Mi hirtiĝis en sovaĝa doloro, tute sensciee. Kiu estis? Ĉu infano? Ĉu songo? Ĉu vojembuskanto? Ĉu memmurdisto? Ĉu tentanto? Ĉu neniiganto? Kaj mi turniĝis por vidi lin – ponto turniĝu! Mi ankoraŭ ne tute turnis min, kiam mi jam falegis, mi falegis kaj jam mi estis disŝirita kaj surpikita de la pintigitaj ŝtonetoj, kiuj ĉiam tiel paceme rigardis min el la muĝanta akvo.

tradukis Dorothea & Hans-Georg Kaiser

laŭ „Die Brücke“

La turbo

Filozofa vagadis ĉiam tie, kie ludis infanoj. Kaj kiam li vidis knabon, kiu havis turbon, li jam embuskis. Apenaŭ la turbo ektorniĝis, la filozofa persekutis ĝin por ĝin kapti. Ke la infanoj bruas kaj provis deteni lin de sia ludilo, ne afliktis lin. Se li kaptis la turbon, tiom longe kiom ĝi turniĝis, li estis feliĉa, sed nur momenton, tiam li ĵetis ĝin teren kaj foriris. Li ja supozis, ke sufiĉas la ekkono de ĉiu eto, do ekzemple ankaŭ de turniĝanta turbo, por la ekkono de la ĝeneralo. Tial li ne okupiĝis pri la grandaj problemoj, tio ŝajnis al li malekonomia. Se la plej eta etaĵo estas efektive ekkonata, jen ĉio estas ekkonata, tial li okupiĝis nur pri la turniĝanta turbo. Kaj ĉiam, se okazis la preparoj por la turnado de la turo, li havis la esperon, ke ĝi nun sukcesos. Kaj se la turbo turniĝis, la espero fariĝis en la senspira kurado je certeco al li. Sed kiam li tiam tenis la stultan lignopecon en la mano, li eksentis sin malbonfarta kaj la kriadado de la infanoj, kion li ĝis tiam ne aŭdis kaj kiu nun subite penetris en liajn orelojn, forpelis lin, li ŝanceliĝis kiel turbo pro nelerta vipo.

*Trad. Dorothea Kaiser & Cezar
laŭ „Der Kreisel“*

Malgranda fablo

„Aĥ“, diris la muso, „la mondo fariĝas pli malvasta post ĉiu tago. Unue ĝi estis tiom larĝa, ke mi timis, mi kuris plu kaj estis feliĉa, ke mi vidis fine dekstre kaj maldekstre en la foro murojn, sed tiuj longaj muroj tiom rapide proksimiĝas unu al la alia, ke mi estas jam en la lasta ĉambro kaj tie en la angulo staras la kaptilo, en kiun mi kuros.“

„Vi devas ŝanĝi nur la kurdirekton“, diris la kato kaj manĝis ĝin.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Kline Fabel“

KUNERT, GÜNTER

Günter Kunert

Konata iu

Iu, kies nomo ne estu nomata, prenis ardantan feron en la manon. Kiel ne alie atendeblis, li bruligis siajn fingrojn. Kaj tiel iris kun tiu iu plu: Li ellasis neniun de la varmegaj feroj, ĉiam supozante, ke tro varmege ĝi ne estos, kvankam ĝi estis tiel. Kaj ĉe la lasta fero, kiam ne nur la sciantoj fermis pro la evidenta blanka ardo la okulojn, sed ĉifoje eĉ la nesciantoj, li ĵuris ke ĝi estos maksimume varmeta: tial li metis ambaŭ manojn en la fajron. La atendita afero okazis, li tenis la vorton kaj sur la flamo liaj manoj tuj karbiĝis. Li opiniis, ke ili postkreskos. Sed tio ne okazis. Jen diris tiu persono, kies nomo ne estu nomata: „Nun mi almenaŭ ne plu povos bruligi la fingrojn al mi!“

Tio foje estas vera optimismo!

Tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Ein bekannter Jemand“

KUNZE, REINER

Reiner Kunze

La fino de l' fabloj

Estis foje vulpo,
la koko komencis
verki fablon

Jen ĝi rimarkis
ke tiel ne eblas verki
Se la vulpo aŭdus la fablon
ĝi kaptus ĝin

Estis foje kamparano
la koko komencis
verki fablon

Jen ĝi rimarkis
ke tiel ne eblas verki
Se la kamparano aŭdus la fablon
li buĉus ĝin

Estis foje...

Vidu tie kaj ĉi tie
fabloj estas plu nenie

tradukis Hans-Georg Kaiser
laŭ „Das Ende der Fabeln“

LA FONTAINE, JEAN DE

Jean de la Fontaine

La konsilio de la ratoj

En la granda remizo de kamparana korto setlis ratoj. Ili vivis tie en ĝuo kaj bruo, ĉar ĉiam denove bonaj manĝaĵoj malsuprenfalis por ili. Sed al la kamparano tio tute ne plaĉis – kaj tial li havigis virkaton al si, kiu transmondigu la ratojn. La virkato rapide elektis la ratojn kiel sian novan frandaĵon. Baldaŭ li jam neniigis pli ol cent el ili kaj tiel transmondigis ilin – kaj intertempe ilia kvanto fariĝis tiom malgranda, ke ili ne plu kuraĝis forlasi siajn truojn.

Tiel tio ne okazu plu kaj tial la ratoj decidis, ke la moŝta konsilio kunsidu.

La mizera, postrestinta resteto de la iam tiom granda rataro kunvenis kaj pripensis kaj interkonsiliĝis, kion oni faru.

Unu el la plej saĝaj ratoj parolis tre prudente: „Estus sencplene, se oni povus kroĉi sonorileton al la virkato.

Tiukaze ni povus aŭdi ĝin jam de malproksime kaj povus ĝustatempe atingi sekuran lokon.“

Al la aliaj ratoj la ideo tre plaĉis – ili laŭdis la kunulon kaj sentis sin plifacilitaj, ĉar ili nun baldaŭ denove pli bone fartos.

Sed la afero fiaskiĝis, ĉar neniu trovis sin, kiu kuraĝis kroĉi la sonorileton al la virkato.

Tiel ne malmulte da bonaj ideoj ne realiĝas, ĉar ne sekvas agoj al vortoj.

tradukis Dorothea & Hans-Georg Kaiser

laŭ „Der Rat der Ratten“

LICHTENBERG, GEORG CHRISTOPH

La ŝuo kaj la pantoflo

Georg Christoph Lichtenberg

La ŝuo kaj la pantoflo

"Kial ne ankaŭ vi havigas al vi bukon, tiel kiel mi", diris la ŝuo al la pantoflo, kiu staris apud li. "Tio estas ja bela aĵo."

"Ĉu buko?" atakis la pantoflo, "por kio tiu utilu al mi?"

"Por kio ĝi servu al vi, la buko, ĉu?" la ŝuo ekscitiĝis, "ĉu vi ne scias tion? Kara Ĉielo, sen buko vi ja tuj firmgluiĝos en la unua marĉo, kiun vi renkontos."

"Ja, kara amiko", respondis la pantoflo, "tien,
kie estas marĉo, mi ne iras."

trad. Hans-Georg Kaiser

laŭ "Der Schuh und der Pantoffel"

LUKIANO

Lukiano

La junulo sur la galopanta ĉevalo

Okazas al vi tute simile kiel al tiu junulo, kiu, kiel oni rakontis, saltis sur kurantan ĉevalon. Tiu sovaĝe rapidege forgalopis kun li. Sed la junulo ne kuraĝis desalti dum la kurado. Jen lin renkontis iu kaj demandis, kien li celas. „Tien, kien plaĉas al ĝi“, respondis la junulo kaj montris sur la ĉevalon.

Tiel ankaŭ vi, se vi volas honori la veron, devas respondi al la demando „Kien vi propre celas iri?“

„Tien, kie plaĉas al la pasioj.“ Foje vi povus diri: „Tien, kien pelas nin la volupto“. Foje: „Tien, kien pelas nin la avido pri famo.“ Foje: „Tien, kien pelas nin la monavido.“ Ĉar jen la volupto, jen la timo kaj jen io alia devojigas vin.

PS: Lukiano el Samosato vivis de la jaro 120 ĝis la jaro 180 p.Kr.

MAUTHNER, FRITZ

Fredĉjo Maŭtner

La viktimo

Estis iam pentristo, kiu lernis multon en la akademio: Desegni kaj froti kolorojn, farbi kaj sin vesti kaj fari grandajn planojn. Krome li ankoraŭ havis mirinde belan amatinon.

Li havis la nomon Kardelo kaj estis sentalenta pentristo. Sed la amatino havis fortajn brakojn, kaj rigide supren turnatajn okulojn; ŝi volis vidi lin supre super ties kunuloj aŭ levi lin alten super ilin, se li ne povas grimpi el propra forto.

Li iradis pigre kaj parolis pri granda bildo, kiu havu la titolon: „La viktimo.“ Morgaŭ li volis komenci. Nur pozistinon li serĉis ankoraŭ por la viktimo“.

Dum jaroj li serĉis sian pozistinon. Fine demandis la amatino: „Ja kian pozistinon vi serĉas? Kion tiu ino kapablas, kion mi ne povas?“

Bela ŝi estu kiel vi, kaj tiun ĉi tranĉilon ŝi devos povi puŝi en sian mamon, rekte starante sur la pozotablo, antaŭ mi.“

„Surkadrigu la tolon“, diris la amatino: „Prenu la kolorplaton kaj malfermu la okulojn!“

Nur bendo solviĝis kaj tuj falis ĉiuj vestoj de ŝi. Nuda ŝi staris tie; svelta kaj plene ekflorinta, ŝi grimpis la tri ŝtupojn supren, surmetis la tranĉilon sub la ŝvelanta maldekstra mamon, rigardis fiere kaj decidiĝinte supren kaj demandis: „Ĉu tiel estas bone?“

„Ne tute“, vokis la pentristo senpacience. „La viktimo“ devas ja rideti! Kun rideto ŝi devas povi puŝi la tranĉilon en sin.“

La amatino ridetis kaj profunde puŝis la tranĉilon kun rideto en sian koron.

La pentristo fariĝis maljuna kaj tamen ne pentris sian grandan pentraĵon. Li postulis ja feliĉan rideton! Kun feliĉa rideto sur la lipoj la viktimo estu devinta morti. Sed la amatino mortante ridetis tute false, amare, mokeme.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Das Opfer“

Gloso: *Fritz estas mallonga formo de Frederiko, do Fredĉjo aŭ Freĉjo.*

MENG, WANG

Wang Meng

Malgranda, eta kaj eĉ pli eta

(satira fablo el Ĉinio)

La regiona teatrostilo de la provinco H., la tielnomata H-teatro, en la lastaj jaroj iom post iom banaliĝis, kaj tio okazis tiel: Antaŭ cent jaroj prezentiĝis tie dotita aktoro kun la artista nomo Xiang-you-hong (Odorante Ruĝa). En ĉiu ĝenro li estis bonega, kiel kantisto kaj aktoro, kiel recitisto kaj akrobato.

Lia famo estis tutmonda. Iom post iom Odorante Ruĝa maljuniĝis kaj ne povis plu prezenti sin. La aktoro, kiun la homoj ekde tiam plej ŝatis, estis la plej preferata lernanto de Odorante Ruĝa, nomata: Odorante Ruĝa la Malgranda. Tiu similis al Odorante Ruĝa ne nur rilate al siaj artistaj kapabloj, sed eĉ laŭaspekte, pro siaj preferoj kaj kutimoj li similis eksterordinare al Odorante Ruĝa. La vizaĝo de Odorante Ruĝa estis ovala kiel melonkerno. Odorante Ruĝa havis la kutimon fumi akvopipon, kaj Odorante Ruĝa la Malgranda tial same fumis ĝin.

Odorante Ruĝa havis sub la maldekstra palpebro denaskan makulon. Tial Odorante Ruĝa la Malgranda per kraĵono desegnis same tian laŭdenaskan makulon sub sian maldekstran palpebron, kaj tiel plu kaj tiel plu. Post kiam ankaŭ Odorante Ruĝa la Malgranda maljuniĝis, Odorante Ruĝa Malgrandeta fariĝis la plej ŝatata artisto de la teatro. Kaj hodiaŭ la plej forta artista kolono de la teatro estas Odorante Ruĝa la Malgrandeteta.

Se oni eĉ pli etigus Odorante Ruĝan la Malgrandetetan, oni proksimiĝus laŭ la leĝoj de la infinitezima kalkulo al nulo.

Tradukis Hans-Georg Kaiser
el germana traduko

MONTERROSO, AŬGUSTO

Aŭgusto Monterroso

La kredo kaj la montoj

Ĉe la komenco la kredo transigis montojn, se tio estis necesa, tiel, ke la pejzaĝo dum jarmiloj restadis sen ŝanĝoj.

Sed kiam la kredo komencis disvastiĝi kaj la homoj trovis plaĉon pri la penso transigi montojn, tiuj montoj faris nenion alian krom moviĝi tien kaj tien, kaj ĉiufoje fariĝis pli komplike trovi ilin ankoraŭ ĉe la sama loko, kie oni lasis ilin en la nokto antaŭe, cirkonstanco, kiu kompreneble kreis pli da problemoj ol ĝi solvis.

La bonaj homoj tial preferis delasi de la kredo, kaj nun la montoj normale restadas starantaj sur sia loko.

Se sur strato okazas terglitado, kies viktimo fariĝas kelkaj vojaĝantoj, jen tial, ĉar iu, proksime aŭ malproksime, ankoraŭ havas restaĵon de la kredo.

trad. Cezar laŭ germana traduko en la libro: „La bovo kaj la harpoludo“, Fabeloj el la tuta mondo, p.329

MOUZI

Mouzi

La bovo kaj la harpoludo

(ĉina fablo)

Gong Mingyi, antaŭlonge festata muzikisto, ludis iutage sur sia harpo delikatan melodion por distri bovon sur paŝtejo.

La bovo tamen maĉis trankvile plu kaj eĉ ne iomete atentis lin.

Jen Gong Mingyi ludis aliajn akordojn sur la harpo, tiel, ke sonis kiel zumantaj kuloj kaj blekantaj bovidoj. Post tio la bovo tuj streĉis la orelojn supren kaj batadis sovaĝe per la vosto kaj komencis vigle troti tien kaj tien. Tia muziko estis evidente pli alloga al li.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ germana traduko

MROŽEK, SŁAWOMIR

Sławomir Mrożek

La cirk-artisto

La koko legis la anoncon: Bestoj serĉataj – la cirko.

„Mi proponos min“, ĝi diris kaj kunmetis la gazeton. „Ĵam ĉiam mi volis fariĝi cirk-artisto.“

Survoje li kreis grandajn planojn: „Gloron kaj oron. Kaj eble eĉ vojaĝojn en la eksterlandon.“

„Kaj reen“, aldonis la vulpo.

„Kial reen? Eksterlande mi subskribos kontrakton ĉe Metro-Goldwyn Mayer.“

La direktoro akceptis ĝin sub la libera aero, kie li havis sian oficejon. Oni ĝuste starigis la cirkotendon. Mi kaj la vulpo haltis ekstaris proksime.

„Mi tre ĝojas, ke vi proponas vin al ni. Ĉu mi bonvole rajtus ekscii vian nomon?“

„Leono“, diris la koko, koncize prezentiĝante.

„Ĉu leono?“ La direktoro ekmiris. „Ĉu vi certas pri tio?“

„Eventuale tigro.“

„Nu, bone do, kriiu foje.“

„La koko kriis tiom, kiom li kapablis.“

„Nu, ne malbone, sed ekzistas pli bonaj leonoj ol vi... se vi prezentiĝus kiel koko, jen tio estus alia afero. Tiukaze mi povus engaĝi vin.“

„Mi eĉ ne pensas pri tio ŝajnigi min birdo por plaĉi al vi“, respondis la koko ofendite.

„Tiukaze do ĝisrevido.“

Sur la retrovojo la koko silentis grumble.

Sed je la fino mi ne plu eltenis tion. „Kiu diablo rajdis vin? Kial vi ludis leonon?“

„Kial, kial...“, respondis la vulpo por la koko. „Ĉu vi iam

ajn vidis cirk-artiston sen ambicio?“

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Der Zirkusartist“ (germana traduko)

MÜHSAM, ERICH

Erich Mühsam

La diveno

Mi trinkis mian matenan kafon kaj divenis nenion malican.

Sonoris la sonorilo. Mi divenis ankoraŭ nun nenion malican.

La leterportisto alportis skribaĵon. Divenante nenion malican, mi malfermis ĝin.

Legeblis nenio malica en ĝi.

„Ha!“ mi vokis. „Mia diveno ne trompis min.“

tradukis Dorothea & Hans-Georg Kaiser

laŭ „Die Ahnung“ el la germana poemkolekto „Hela kaj rapida“

PESTALOZZI, JOHANN HEINRICH

Johano Henriko Pestaloci Stranga promenrajdo

Viro rajdas sur sia azeno hejmen kaj lasas piediri sian bubon apud si. Jen venas migranto kaj diras: „Tio ne estas justa, patro, ke vi rajdas kaj lasas piediri vian filon. Vi havas pli fortajn membrojn.“ Jen la patro desaltas de la azeno kaj lasas rajdi la filon.

Jen venas denove migranto kaj diras: „Tio ne estas en ordo, bubo, ke vi rajdas, kaj lasas iri piede vian patron. Vi havas pli junajn gambojn.“ Jen ambaŭ eksidis sur la azeno kaj rajdis certan distancon. Jen venas tria migranto kaj diras: „Kia stultaĵo estas tio, du rajdistoj sur unu malforta besto. Ĉu oni ne prenu bastonon kaj pelu vin malsupren?“ Jen ambaŭ desaltis de la azena dorso kaj iris surpiede, dekstre la patro kaj maldekstre la filo, kaj en la mezo la azeno. Jen venas kvara migranto kaj diras: „Vi estas tri strangaj kunuloj. Ĉu ne sufiĉas, se duopo iras piede? Ĉu vi ne irus pli facile, se unu el vi rajdus?“ Jen la patro kunligis la antaŭpiedojn de la azeno, kaj la filo

kunligis ties malsuprajn piedojn. Poste ili traŝovis fortan arbotrunkon, kiu staris ĉe la strato ka portis la azenon sur la ŝultroj hejmen.

Tiel povas okazi, se oni volas agi laŭ ĉies plaĉo.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Seltsamer Spazierritt“

TOLSTOJ, LEV

Lev Tolstoj

La kulo kaj la leono

(fablo)

Kulo flugis al leono kaj parolis al ĝi: „Certe vi pensas, ke vi estas pli forta ol mi. Sed tio estas eraro, karulo! Ja kiel helpu al vi via granda leonforto kontraŭ mi, se mi atakos vin? Vi vane gratos per viaj ungoj kaj mordos per viaj dentoj, tiel kiel la vilaĝaninoj, kiam ili kverelas kun siaj edzoj. Mi pruvos al vi. Ek do, ni batalu unu kontraŭ la alia!“

Kaj la eta insekto kriis sian altsonan zumantan kulobatalkrion, ĵetiĝis sur la leonon kaj pikis ĝian senteman nazon, ĉiam denove.

La leono batis per siaj ungegoj al la kulo, unue ĉagreniĝinte, post koleriĝinte. Sed ĝi vundgratis tiel nur sian propran vizaĝon kaj ne povis suferigi la rapidan kulon. Finfine, sangante kaj lacigite, ĝi rezignis batali plu.

La kulo triumfe zumis kaj forflugis, tiom konvinkite pri si mem, ke ĝi preskaŭ krevis pro fiero. Sed, ĉar ĝi ne atentis pri tio, kien ĝi flugas, ĝi flugis rekte en la reton de araneo, kaj la araneo rampis al ĝi kaj komencis suĉi ĝian sangon.

„Mi venkis la leonon, la plej fortan el ĉiuj bestoj“, pensis la kulo antaŭ ol ĝi mortis, „kaj nun min mortigas – kia maljusteco – mizera araneo!“

PS: Ankaŭ la verkiston B.Traven interesis la demando.

Bonvolu legi: B.Traven: Kiu estas la mastro de l' vivo?

B.Traven

Kiu estas la mastro de l' vivo?

(eltiraĵo el la romano „Rozo Blanka“)

Eble Hacinto, la indiĝeno, estis la mastro de l' vivo, kiu posedis Rozon Blankan sen posedi ĝin. Li eble estis la mastro de l' vivo ĝis tiu tago, kiam oni eltrovis, ke Rozo Blanka portas nafton en sia tero.

Tiam ankaŭ Hacinto Yanyez ne plu estis la mastro de l' vivo; ĉar nun ankaŭ li fariĝis sablero ĵetata en la maŝino

tien kaj tien.

Eble Margarito estis la mastro de l' vivo, tiu Margarito, kiu kuracadis la mulojn, kiu komprenis la lingvon de la muloj, kiu infere kapablis sakri kaj melodie kanti dolĉajn baladojn en la sama momento.

Eble la compadres de Rozo Blanka estis la mastroj de l'vivo. Tiom longe, ĝis ili perdis sian hejman regionon.

Eble la mastro de l' vivo estis la leono en la ĝangalo. Sed la puloj estis pli fortaj ol ĝi, ĉar ili molestis ĝin. Kaj ĝi ne povis defendi sin kontraŭ ili; dorno, kiun ĝi tretis en sian piedegon, estis pli forta ol ĝi, ĉar la dorno lamigis ĝin; la venena serpento, kiu mordis ĝin en la nudan nazon, se ĝi estis neatentema, povis faligi ĝin, kaj tial ĝi estis pli forta ol la leono.

Eble la mastro de l' vivo estis la kolorriĉa papilio, kiu ŝvebis kiel ondo de floro al floro kaj zorgis pri nenio, ĝuis sian vivon, ĝis ĝi kaptiĝis en la reto de araneo, kiu estis pli forta ol ĝi.

Eble la mastro de l' vivo estis la klasfiera laboristo, kiu boksis sian skipestron teren kaj sufiĉe draste tradraŝis lin, ĉar la skipestro, kiu sentis sin pli forta kaj pli potenca, kriis lin vizaĝen. Sed la diligenta laboristo pli produktis ol la merkato povas uzi, kaj la fabriko ne plu povis pagi la viron kaj devis maldungi lin; kaj liaj infanoj ŝiris la karnon de la laboristo, ĉar ili estis malsataj kaj sentis sin kiel mastroj de l' mondo, kies sklavo kaj subulo estas laŭ ilia opinio la propra patro.

PS: B.Traven: La Rozo Blanka (romano)

Leono: "La terglobo kaj mi!"

TURGENJEV, IVAN

Ivan Turgenjev Du virtoj

La plej alta estaĵo aranĝis en sia lazura palaco grandan feston. Ĉiuj virtoj estis invititaj, sed nur la inaj, neniuj viraj. Aperis tre multaj, grandaj kaj malgrandaj. La malgrandaj virtoj estis pli agrablaj kaj pli amindaj ol la grandaj; sed ŝajne ĉiuj estis tre kontentaj kaj ili interparolis eksterordinare afable, tiel, kiel decas por proksimaj parencoj kaj konatoj. Sed jen la plej alta estaĵo rimarkis du belajn damojn, kiuj ŝajne ankoraŭ tute ne konis sin reciproke. La dommastro kaptis unu el la damoj ĉe la mano kaj kondukis ŝin al la alia.

„Jen Karitato“, li parolis, dum li montris al la unua. „Jen Dankemo“ li aldonis kaj montris al la dua.

Ambaŭ virtoj estis tute mirigitaj. Ekde la kreado de l' mondo, kaj tio estis antaŭ longa tempo, ili renkontiĝis la unuan fojon.

Tradukis Hans-Georg Kaiser
laŭ germana traduko

WENG YING, MONAĤO

Monaĥo Weng Ying

Malnovaj kutimoj

(el la periodo de la dua imperiestro de Ĉinio)

Ĵus nomumite, prefekto aranĝis por la oficistoj kaj altranguloj de lia ofica distrikto grandan feston, al kiu estis disponigita ankaŭ multaj muzikistoj por la distro de la gastoj. En la kulmino de la festo kantisto prezentiĝis: „For la malnovan, eniĝu la nova; for la malfeliĉstelon, eniĝu la feliĉstelo!“

La prefekto sentis sin ege flatata.

„Kiu verkis tion?“ li demandis.

„En nia urbo estas malnova kutimo, nome tiu kanti tiun ĉi kanton ĉiufoje je la alveno de nova prefekto. Estas ankaŭ la ununura kanto, kiun mi konas“, respondis la kantisto.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ germana traduko en kolekto pri ĉinaj saĝoj

YUNKE, JIANG

Jian Yunke

Ĝiboj estas kuracataj

(Ĉina fablo el la dekkvina jarcento)

Fuŝkuracisto asertis, ke li povas kuraci ĉiujn kurbigitajn spinojn. „Kiom ajn via dorso estas kurbigita, ĉu ĝi similas al arĉo, al ringo aŭ al pototo, venu nur al mi, mi rektigos ĝin dum mallonga tempo!“

Ĝibulo estis sufiĉe fidema akcepti ties vortojn kiel seriozajn kaj pretis lasi kuraci sin de li. La fuŝkuracisto ordonis al li, ke li sternu sin sur tabulo, metis duan sur lian ĝibon kaj poste kun sia tuta forto saltadis sur ĝi. La ĝibo fariĝis rekta, sed la viro mortis.

La filo de la ĝibulo volis akuzi la fuŝkuraciston, sed tiu diris: „Mia tasko estis rektigi lian ĝibon. Sed ĉu li mortos post tio tute ne temis.“

tradukis Doroteha & Hans-Georg Kaiser el germana traduko de la ĉina originalo

A N E K D O T O J

Anonimulo

Doni estas pli benigna ol preni

Coelho, Paul

La heroldo de l' bono

Galgo en Peruo aŭ libero kaj justeco

Huebner, Wolfgang

De l' vento forblovita

Roda Roda

La poŝtaĵoj

Tucholsky, Kurt

La pulo

ANONIMULO

Anonimulo

Doni estas pli benigna ol preni

Anonima anekdoto el la regiono de Altenburgo

Lernanto, kiu frekventis lernejon en Altenburgo, promenis rondire kun sia instruisto je malfrua posttagmezo en la ĉirkaŭo de la urbo. Jen ili vidis ĉe la vojo paron da ŝuoj. Ili apartenis al povrulo, kiu laboris sur proksima agro.

La lernanto diris al la instruisto: Ni mistifiku la viron, ni kaŝu la ŝuojn post la proksima arbustaĵo. Kiel la viro reagos, se li ne plu trovos la ŝuojn?“

„Mia kara amiko“, respondis la instruisto, „oni neniam faru ŝercojn koste de la povruloj. Prefere metu en ĉiun ŝuon oromoneron, poste ni observu, kio okazos.“.

La lernanto havis nur dekkvin jarojn kaj obeis al sia instruisto.

Kiam la povra viro jam finis sian laboron, li iris al la

rando de la kampo kaj ĵus volis surmeti siajn ŝuojn; jen li rimarkis en ambaŭ ŝuoj oran moneron. Li rigardis al ĉiuj flankoj, sed vidis neniun. Tial li metis la monon en pantalonpoŝon. Li falis surgenuen, rigardis al la ĉielo kaj vokis: „Ho, Dio, Dio mia, tiel estas do vere, ke vi ne forlasas tiujn, kiuj fidas al vi. Vi scias, ke miaj infanoj ne havas panon kaj, ke mia edzino estas malsana. Mi estas tiom dankema pro tiu donaco.“

La lernanto staris, ankore profunde tuŝite, kaj havis plorojn en siaj okuloj. La instruisto rimarkis: „Kio estas do pli bona, mistifiki povrulon aŭ tiu ĉi bona dono?“

La lernanto klarigis: „Vi kiel instruisto tre helpis al mi, tion mi ne forgesos dum mia tuta plua vivo. En ĉio ĉi montriĝas ja la belaj vortoj: „Doni estas pli benigna ol preni.“

***PS:** Efektive, tiel estas, humaneco ekzistas nur tiukaze, se ni mem agas humane. Iu dio ne faros tion por ni. Bonecon ni kreas mem, per niaj bonaj agoj, per nia solidareco al aliaj. Se ni ne mem agas tiel, ni ne atendu tion de aliaj, eĉ ne de konataj*

aŭ nekonataj dioj. Jen ankoraŭ plua tre grava penso: Boneco ne ekestas per malboneco. Tio estas nur agrabla iluzio por tiuj, kiuj regas aliajn aŭ per sia mono, per sia ofico aŭ eĉ per perforto. (cez)

COELHO, PAUL

La heroldo de l' bono

Galgo en peruo aŭ libero kaj justeco

La heroldo de l' bono

(anekdoto pri Leonardo da Vinci)

En la mezepoka jaro 1476 interparolis du viroj en preĝejo. Ili haltis kelkajn minutojn antaŭ bildo, kiu montris du anĝelojn, kiuj mane ĉe mane paŝis malsupren en urbon.

„Ni travivas la teruran tempon de l' pesto“, diris unu el la viroj. Bildoj pri anĝeloj apenaŭ adapteblas al nia tempo.

„Tio estas bildo pri la pesto“, diris la alia. Estas bildoprezento el la tielnomata *Legenda Aurea*, religia popollibro el la mezepoko. La ruĝvesta anĝelo estas Lucifero, la maliculo. Rigardu, je la zono li portas saketon. En ĝi estas la epidemio, kiu detruis nian vivon kaj tiun de nia familio.“

La alia viro rigardas la bildon detale. Efektive Lucifero portis saketon ĉe si. Sed la anĝelo, kiu kondukas lin, male aspektas trankvila, paca kaj iluminata de Dio.

„Se Lucifero alportas la peston, kiu do estas la alia, kiu kondukas lin mane?“

„Tio estas la anĝelo de l' Sinjoro, la heroldo de l' bono.
Sen lia permeso la malica neniam povus montri sin al ni.“

„Kaj kion li faras?“

„Li montras al li la lokon, en kiu la homoj pere de la malfeliĉo estu purigitaj.“

Oni rakontas, ke Leonardo da Vinci, kiam li planis sian faman freskobildon „La lasta vespermanĝo“, estis konfrontata al granda malfacilaĵo. Li devis pentri la bonon en bildo de Jesuo – kaj la malbonon en bildo de Judaso. Kiam li iutage aŭskultis ĥoron, li vidis inter la kantistoj knabon, pri kiu li pensis, ke li povus esti ideala modelo por la figuro de Kristo. Li invitis lin en sian atelieron, desegnis studojn kaj skizojn de li. Antaŭ ol la knabo foriris, li montris al li skizon pri „Sankta Vespermanĝo“ kaj diris al li, ke li donos al Jesuo la vizaĝon.

Tri jaroj pasis. „Sankta Vespermanĝo“, kiu estis ornamonta unu el la plej konataj preĝejoj de la urbo, estis preskaŭ finita – sed Leonardo ankoraŭ ne trovis la

idealan modelon por Judaso.

La kardinalo, respondeca por la preĝejo, komencis urĝi Leonardon, postulis de li rapide fini la verkon.

Post kelkaj tagoj de serĉado la viro renkontis multe tro frue aĝiĝintan junan viron, kiu havis ĉifonojn sur la korpo kaj kuŝis ebrie en stratkanaletoj. Li petis sian asistanton konduki lin en la preĝejon, ĉar li ne plu havis tempon por skizi lin.

La almozpetanto estis kondukata tien, sen vere kompreni, kio okazas. La asistantoj apogis lin tiel, ke li staris rekte, dum Leonardo kopiis ties vizaĝtraĵojn, en kiujn tiel konturite fosiĝis nekompatemo, peko kaj egoismo.

Kiam Leonardo estis preta kun sia laboro, la almozpetanto malfermis la okulojn, ĉar lia ebrieco iom perdiĝis. Li rimarkis la freskon antaŭ si kaj diris en mikso el teruriĝo kaj malĝojo: „Mi jam iam vidis tiun bildon.“

„Kiam?“ demandis Leonardo.

„Antaŭ tri jaroj, antaŭ ol mi ĉion perdis, kion mi posedis.

Tiam mi kantis en ĥoro kaj artisto invitis min esti la
modelo por la vizaĝo de Jesuo.“

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Der Herold des Guten“

Galgo en Peruo aŭ libero kaj justeco

Malnova perua legendo raportas pri urbo, en kiu ĉiuj estis feliĉaj. La loĝantoj faris tion, kio plaĉis al ili. Krome ili bone interrilatis kun la aliaj. Nur la urbestro estis malgaja, ĉar li havis nenion, kion li povus regi. La prizono estis malplena, la juĝejo neniam estis uzata, kaj la notario enspezis nenion, ĉar la donita vorto pli valoris ol iu papero.

Iutage la urbestro vokis kelkajn metiistojn el malproksima loko al si, por ke ili konstruu sur la placo meze de la urbo dometon el tabuloj. Unu semajnon oni aŭdis la marteladon kaj segadon. Ĉe la fino de la semajno la urbestro invitis ĉiujn loĝantojn de la urbo al la inaŭguro. Solene oni forigis la tabulojn. Kaj antaŭ iliaj okuloj aperis – galgo.

La homoj demandis reciproke, por kio la galgo estu bona. Timeme ili komencis laborigi la juĝejon pri aferoj, kiuj antaŭe bone estis regulitaj per interkonsento. Ili iris al la notario por registrigi dokumentojn tiajn, kiajn antaŭe oni intertraktis buŝe. Kaj ili komencis sekvi la

konsilojn de la urbestro pro ektimo de la leĝo.
La legendo asertis, ke oni neniam uzis la galgon. Ties
nura ĉeesto jam ŝanĝis ĉion.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ germana traduko

HUEBNER, WOLFGANG

Wolfgang Huebner

De l' vento forblovita

Oni petis sinjoron Mosekund, ke li transprenu la paroladon en funebra ceremonio. Li tre ŝatis la intiman konaton kiel parolpartneron, kvankam tiu jam delonge estis forgesema kaj sufiĉe kaprica, sed alikaze li legis tre multe, kio ne estas miraklo, ĉar, li pasigis kiel profesoro multajn jarojn en universitato. Kiam la funebrantaro marŝis al la tombejo leviĝis morna ŝtorma vetero. Mallonge antaŭ la celo stumpletis la urnoportisto; la kovrilo de la urno falis malsupren kaj forta ventoblovo forportis grandan cindroparton de la mortinto. Ĉar nun ankaŭ forta pluvo kvazaŭ vipis la ĉeestantaron, la parolisto Mosekund limigis sian parolon al ununura frazo: „Li estis ĉiam distrita profesoro.“

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Vom Winde verweht“ el la feliotona paĝo „Lundo de Mosekund“ de la germana gazeto „Die Zeit“ (La tempo“

RODA RODA

Roda Roda La poŝtaĵoj

(humuraĵo)

Etaĝon sub mi loĝis sinjoro Robert Roder.

Sed mi nomiĝas Roda Roda.

Jen okazas de tempo al tempo, ke la leterpoŝtisto tro supraĵe legas la adresojn kaj tial transdonas miajn poŝtaĵojn malsupre. Tiukaze tiu Robert Roder regule malfermas miajn leterojn kaj sendas ilin kun senkulpiga letero supren al mi. Li skribas, ke li rapide malfermŝiris la koverton, sed jam el la unua linio legis, ke la letero apartenas ne al li, sed al mi, ke tial li permesas al si ... ktp ...

Hieraŭ tio fariĝis tute netolerebla por mi. Mi petis mian plej bonan amikon, ke li skribu por mi leteron kun la komencaj vortoj: „Ho, vi domaĝulo de la komuneco, sintenokrokodilo, bizonreĝo de ambaŭ mondoj kaj Prezidanto de la Regna Ligo de l' Unuiĝo de Idiotoj...“

Tiun leteron mi do sendis al sinjoro Roder kun ena karto:
„Mi erare akceptis la ĉikunan skribaĵon - sed, ĉar jam
legeblas el la unua linio, ke ĝi estas por vi, tre ŝatata
sinjoro ... ktp ...“

Robert Roder vokis al mi poste sur la ŝtuparo, ke de nun
li tre atente legos la adresojn.

Tradukis Hans-Georg Kaiser
laŭ „Postsachen“

TUCHOLSKY, KURT

Kurt Tucholsky **La pulo**

En la departemento *du Gard* – tute ĝuste, tie, kie situas *Nîmes* kaj la *Pont du Gard*: en la suda Francio – jen sidis en poŝtoŝtanco jam ne plu juna fraŭlino kiel oficistino, kiu havis malican kutimon: ŝi malfermis ĉeokaze la leterojn kaj legis ilin. Tion sciis ĉiu en la loko. Sed en Francio estas tiel: *concierge*, telefono kaj la poŝtoŝtanco, tio estas sanktaj institucioj, kaj tiujn oni ja rajtas tuŝi, sed oni ne tuŝu ilin, kaj tial ankaŭ neniu faras tion.

La fraŭlino do legis la leterojn, kaj kun siaj maldiskretaĵoj ŝi kelkfoje ĉagrenis la homojn.

En la departemento vivis sur bela kastelo prudenta grafo. Grafoj de tempo al tempo estas prudentaj, en Francio. Kaj tiu grafo faris iutage la sekvan:

Li mendis al si juĝejan ekzekutiston en la kastelon kaj verkis en ties ĉeesto al amiko:

Kara amiko!

Ĉar mi scias, ke fraŭlino Emilie Dupont de la poŝtejo
ĉiam malfermas siajn leterojn, ĉar ŝi preskaŭ krevas pro
pura scivolo, mi sendas ĉi-kune, por foje fini ŝian fi-
kutimon, vivantan pulon.

Kun multaj belaj salutoj!

Grafo Koakso

Kaj tiun leteron li fermis en ĉeesto de la juĝeja
ekzekutisto. Sed li ne enmetis pulon. Kiam la letero
alvenis, enestis pulo.

Tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Der Floh“

R E D A K T O F I N O

03.12.2016